Ottoneum

Ottoneum estas nuntempe naturhistoria muzeo en Kassel, Germanio, Steinweg nr 2.

La muzeo naturhistoria de Kaselo

Enhavo

Historio teatreja
Naturscienca uzo
Vidindaĵoj
Eksteraj ligiloj

Historio teatreja

Inter 1603-06 la de Wilhelm Vernukken laŭ komisio de landgrafo Morico (Hesio-Kaselo) farita konstruaĵo gastigis la unuan nemigrantan aktorotrupon, do estis la unua dramteatrejo kun firma sidejo en Germanio.

Kiam oni alikonstruis ĝin en 1696 al muzeo por gastigi partojn de la landgrafajn kolektojn, Paul du Ry forprenis la spektantarejon kaj la scenejon. Antaŭ la orienta fasado kun imponsa voluta gablo renesancstila li metis balkonon kuŝantan sur kolonoj.

Naturscienca uzo

En 1709 estis instalita en subtegmentejo anatomia sekcio kaj flanke propra stelobservejo; tiam estis ja fondita la kolegio "Collegium Carolinum". En la ejo, kies funkcioj ofte ŝanĝiĝis, malfermigis la urba magistrato en 1884 muzeon naturhistorian.

Okaze de restaŭro de inter 1995-96 oni, malobservante monumentprotektajn leĝojn, metis surkonstruaĵe tegmenton el lado kun vitraj stritoj.

La dum pluraj jaroj en Kaselo agintan fizikiston kaj inventiston Denis Papin memoras monumenta fontano de la skulptisto Hans Everding el la 1906-a jaro rekte antaŭ la ĉefa fasado.

Vidindaĵoj

La plej gravaj elmontritaĵoj en la muzeo estas la 400 jaron Ratzenberger-herbarkolekto, la ligna biblioteko de Carl Schildbach kaj la t.n. Goeto-elefanto (skeleto).

Eksteraj ligiloj

Hejmpaĝo (http://www.naturkundemuseum-kassel.de)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Ottoneum&oldid=5924857"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 19:36, 16 apr. 2016.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.